



estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ por la mondo).

Numero 191

Marto 2002

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto
Stevens Norvell — kompostisto
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto
Sendu leterojn kaj artikolojn al:

Bob Williamson
329 Poplar Drive
Dartmouth, Nova Scotia
KANADO B2W 4K8
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:
Reni Porter
71 RidgeValley Road
Halifax, Nova Scotia
KANADO B3P 2E5

Abono por Kanado aŭ Usono estas \$8 (kanadaj) kaj por aliaj landoj estas \$15

★ ★

LETERO DE LA PREZIDANTO DE KEA

3an de februaro 2002

Karaj Novskotianoj, gastoj (kaj kompreneble ankaŭ afabla sinjoro gastiganto!):

Mi hazarde aŭdis, ke vi ĉiuj kunvenas hodiaŭ ĉe nia samideano d-ro Norvell, kaj mi simple volis kapti la okazon por varme saluti vin ĉiujn de la Pacifika flanko de nia vastega lando. Mi ne scias, ĉu estas iu speciala kialo aŭ temo por via hodiaŭa kunveno, aŭ ĉu vi simple ŝatas babilaĉi, kiel kelkaj el niaj Vankuveranoj! Sed mi pensas, ke eble mi povos ja doni al vi apartan motivon por la kunveno.

Kvankam nia Kanada Esperanto-Asocio ne estas (ankoraŭ!) tre multnombra Asocio, mi kiel prezidanto tamen konstatis, ke en preskaŭ ĉiu loka grupo troviĝas kelkaj veraj juveloj dise tra la lando - t.e. tiuj laboremaj kaj konvinkitaj personoj, kiuj per sia sindonemo (ĉu kiel funkciuloj de loka grupo, ĉu kiel instruantoj de la lingvo, ĉu kiel mecenatoj ktp.) helpas ne nur vivteni la Asocion, sed kelkfoje eĉ progresigi ĝin malgraŭ la multaj obstakloj, kiuj alfrontas nin en Kanado. Kaj certe inter tiuj personoj ni povas kalkuli vian hodiaŭan gastiganton, kiu dum multaj jaroj fidele kaj multflanke servis kaj nian Asocion kaj nian lingvon. Nome de la Asocio mi do volas elkore danki al Steĉjo pro lia granda sindediĉo kaj oferemo al nia Afero, kaj havas hodiaŭ apartan honoron nun publike anonci, ke la Estraro de Kanada Esperanto-Asocio ĵus voĉdonis por elekti Steĉjon Norvell sian Honoran Membron por la jaro 2002.

Mi do invitas vin ĉiujn nun levi vian vinglaseton/tetason/kaftason por tosti al nia nova Honora Membro: „Ankoraŭ multajn jarojn al li! Kaj vivu Esperanto!”

Plej varmajn salutojn al ĉiuj sendas via
Brian D. Kaneen
Prezidanto, Kanada Esperanto-Asocio



LEGINDA LIBRO - MASKERADO DE SOROS

Dum la Aŭtunaj Tagoj de EAF* 28.-30.IX.2001 en Helsinki Istvan Ertl tre interese kaj kun verva entuziasmo prezentis la verkon *Maskerado Ĉirkaŭ La Morto* de Tivadar Soros (1894-1968). Temas pri la dua eldono en 2000 sub redakto kaj kun komentario de Humphrey Tonkin. Unue ĝi estis eldonita en Esperanto en 1965 de Juan Regulo ĉe lia eldonejo Stafeto en Kanariaj Insuloj. Facile mi faris rapidan decidon: hejmenveninte mi tuj fakse mendis la libron pere de UEA-libroservo en Rotterdam. Laŭ mia peto Simo Milojevic sendis ĝin aerpoŝte al Turku. Jam post kelkaj tagoj mi komencis foliumi tiun novan trezoron, kiu ne plu povis trankvile ripozi sur breto, sed devis sekvi min en mia teko kiel fidela adjutanto. Febra inspiro kaptis min - ĉie mi legis kaj legis kaj ne povis halti. Similan sperton mi havis en 1954, kiam aperis *La Nekonata Soldato* de Vinna.

Kiel oni povas diveni, temas pri lukto inter vivo kaj morto. Trista estas la ĉefa fadeno de la enhavo. Tamen ne mankas bonhumoraj trajtoj, kiuj ĵetas sunbrilon sur streĉajn kaj danĝerajn aventurojn. Aparte menciindaj estas la antaŭparoloj de Paul kaj George Soros, la filoj de la gepatroj Tivadar kaj Erzsebet. *Maskerado* pritraktas periodon de malpli ol unu jaro 1944-45 en la hungara historio, sed jaro en kiu centoj da miloj da hungaraj judoj, kaj ankaŭ multaj aliaj hungaroj, estis markitaj por morto. Eble povus esti utile unue tralegi la postparolon de la redaktoro. Ĝi donas fekundan fonon por pli bone kompreni la kernon de tiu ĉi biografia verko.

George Soros aludas al la jaroj 1944-45 pasigitaj en Budapeŝto kaj skribas: "Mi havis tiam patron, kiun mi adoris, kiu regis la situacion, kiu sciis kion fari kaj kiu helpis aliajn homojn." Mallonge dirite, Tivadar Soros, kiu maskis sian singardan kaj ruzan ŝirmemon malantaŭ facilanima kaj senĝena optimismo, estis tiu patro pri kiu revas ĉiu knabo ĉirkaŭita de danĝero. La 14-jara Gyuri, kiu fariĝis plenkreska George, mense transformis tiun tempon de danĝero en grandan aventuron: ĝuste kiel intencis la patro, kiu sciis, ke la familio devas vivi per sagaco kaj intuicio - se entute.

Maskerado aperis en Britio ĉe la eldonejo Canongate aŭtune en 2000 kaj poste en Usono ĉe la eldonejo Arcade en Novjorko aŭtune en 2001. Humphrey Tonkin mesaĝis retroŝte en januaro 2002, ke „la libro jam aperis ankaŭ en rusa kaj turka tradukoj, germana nun estas eldonata kaj hungara sekvos.” Brita gazetaro recenzis la verkon *Masquerade* tre favore kaj vere multan spacon tiucele donis i.a. „Daily Mail” kaj „The Sunday Times”, ambaŭ en Londono.

Ĝus nun mi eklegis la supremenciitan verkon la duan fojon tiel, ke unue mi studas unu ĉapitron en Esperanto kaj poste la saman en la angla lingvo. Facile oni konstatas, kiel bele kaj ŝajne facile Humphrey Tonkin uzas kaj la anglan kaj la Esperantan lingvojn. Flua kaj ĝuinda estas la stilo de la aŭtoro. La traduko estas vere vivanta kaj neniel rigide laŭvorta, sed esprimive elasta. Tion povas rimarki eĉ nesperta alilingvulo. Ne necesas ĉion rakonti kaj esprimi ĉi tie. Indas havigi la 318-paĝan libron kaj mem sekvi kuraĝe la neforgeseblajn aventurojn de Soros-familio en la ĉefurbo de Hungario antaŭ proksimume sesdek jaroj.

— Jorma Ahomäki

* Esperanto-Asocio de Finnlando

„EĈ GUTO MALGRANDA...”

Informado en nia movada agado estas pli ol grava. Tio estas simpla, nekontestebla fakto. En novembro 1998 koreano KIM Hiongun skribis (ESPERANTO-UEA n:ro 1108-11/1998), ke estus utile uzi ankaŭ la anglan lingvon tiucele pli efike kaj larĝskale. Nun ni havas bonan okazon plugi tiun sulkon per la konata verko *Masquerade* (ISBN 1-55970-581-7) de Tivadar Soros, aperinta pasintaŭtune 2001 en Novjorko. Indas proponi ĝin por kolektoj de publikaj bibliotekoj, ĉar ekzemple la postparolo de la redaktoro (prof. Humphrey Tonkin) en la libro donas taŭgajn informajn erojn pri Esperanto al legantoj. Jam ni spertis en Finnlando favoran sintenon tiurilate en universitataj bibliotekoj kaj en urbaj ĉeflibrejoj. Respondecoj en tiu medio tuj komprenas la valoron de la menciita publikaĵo, ĉar la nomo Soros estas konata ĉie en la mondo. Ĝenerale dirite antaŭ ĉio la filo George pli reputacias, sed la patro Tivadar ankaŭ meritas nian atenton.

Oni fondis en Finnlando elastan laborgrupon, kies membroj fariĝis Tuomo Grundström (Rauma), Sylvia Hämäläinen (Tampere-Ylöjärvi), Seija Kettunen (Jyväskylä), Irja Miettinen (Lappeenranta) kaj Jorma Ahomäki (Turku-Piispanristi). Ili ĉiuj, cetere ankaŭ UEA-delegitoj, vizitos en sia hejmregiono bibliotekistojn kaj proponos havigon de la supre menciita anglalingva libro sur bretojn de publikaj bibliotekoj. Favorajn recenzojn aperintajn en gazetaro liveris al Turku prof. Tonkin. Similan materialon oni trovas facile ankaŭ en la reto. Tiaj tekstoj subtenas nian argumentadon en la agado. Substrekindas, ke tiu ĉi laborkampoj estas libere je dispono de ĉiuj volontuloj. Jen eta, sed grava tasko por kiu ajn, ĵus nun preta por aktiva kaj interesa kontribuado en informa agado. Pli detalajn informojn pri la afero donas laŭbezone la subskribinto - do ne troe cerbumu, sed ekagu kiel eble plej rapide. „Eĉ guto malgranda, konstante frapante, traboras la monton granitan.”

Jorma Ahomäki, Finnlando
jorma.ahomaki@pp.inet.fi

SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO 2002

La rondeto de esperantistoj en Nova Skotio vere ne planis publikan nek privatan ceremonion por festi la ĉi-jaran Semajnon de Internacia Amikeco (SIA), malgraŭ la instigo al agado de Wally Du Temple en Brita Kolumbio. Tamen, eksterlanda vizitanto bonŝance helpis al ni komenci ĝin. Dimanĉon la 17an de februaro ĉe la hejmo de Kim Keeble kaj Connie Clarke en la kampara vilaĝo de Upper Rawdon, prof. SO Jinsu ĉeestis nian kunvenon. Ĵinsu, la plijuna frato de SO Gilsu, estas profesoro de ekonomiko en Kangnam Universitato en antaŭurbo de Seulo, Koreio. Li pasigis tri semajnojn en Kanado dum februaro, kaj vizitis esperantistojn en Vankuvero, Halifakso, Montrealo, Otavo kaj Toronto. Ĵinsu estas lerta kaj sperta esperantisto, kaj li interesoplene diskutis la politikan kaj ekonomian situacion de sia lando. Li multe interesiĝas pri turismo - li jam vizitis pli ol 50 landojn - kaj li estris la turisman fakon de la UK en Seulo. Dum sia vizito ĉe ni, li ŝajnis multe ĝui la kampanan trankvilecon, kiu kontrastas al urbega bruoj. Estis bona ripozo por li, kaj estis agrabla bonŝanco por ni povi ageme ĝui la komenciĝon de la ĉi-jara SIA.

La redaktoro

NOVA KONKURSO DE POLA RADIO 2002

Karaj Geaŭskultantoj,

... Komence de februaro ni anoncis laŭvican konkurson, kiu ni kredas alportos novajn argumentojn al ni kaj al niaj superuloj pri la graveco de la esperantlingvaj programoj el Varsovio. Ja inter niaj geaŭskultantoj troviĝas multaj novaj radioamikoj, inter niaj superuloj (multkaze ankaŭ novaj) estas personoj, kiuj ne ĉiam tuj rimarkas la informan valoron de niaj programoj, firme kredante, ke la rolon de la internacia lingvo en la nuntempa mondo kontentige plenumas la angla lingvo.

Jen nia konkursdemando: „Kian signifon havas por vi persone kaj por eksterlandanoj ĝenerale la Esperantlingvaj elsendoj de Pola Radio en la situacio, kiam ni frontas la laŭvican etapon de la eŭropa integriĝado kaj fenomenojn ligitajn kun la tutmondiĝo?”

Ni substreku, ke:

- 1) Niaj E-elsendoj estas aŭdigataj el la naskiĝlando de Esperanto kaj ĝia kreinto Ludoviko L. Zamenhof;
- 2) Niaj elsendoj estas aŭdigataj el la lando, en kiu komenciĝis la demokratiigaj procezoj en la Orienta Eŭropo;
- 3) Niaj elsendoj estas aŭdigataj el la lando, kiu donis al la mondo multajn rimarkindajn kaj eminentajn figurojn, kiel ekzemple Johano Paŭlo II.
- 4) Niaj elsendoj estas aŭdigataj el la lando, kiu multe kontribuis al la monda kulturo kaj scienco; La nomoj de i.a. N. Kopernik, M. Curie-Sklodowska, F. Chopin, K. Penderecki, A. Wajda, T. Kieslowski, Cz. Miłosz, W. Szymborska, signifas kontribuon al la evoluo de la homaro.
- 5) Niaj elsendoj estas aŭdigataj el la lando, pri kiu kaj pri kies najbaroj la informado en la mondaj amaskomunikiloj, eĉ la eŭropuniaj estas preskaŭ nula.

La respondojn - interrete, poŝte, fakse ni atendas ĝis la 20-a de marto de la 2002-a jaro. Viajn konkursaĵojn direktu do al: esperanto.redakcio@radio.com.pl; aŭ Pola Radio, Esperanto Redakcio, 00-977 Varsovio, poŝtkesto 46, Pollando aŭ Pola Radio, Esperanto Redakcio, faksonumero +48 (22) 645 59 17. Ni estos dankemaj se vi volos mencii vian aĝon kaj profesion.

La kontribuaĵojn al la konkurso ni prezentos fragmente en niaj dimanĉaj „Leterkestoj”, la preparolon de la konkurs-rezultoj ni prezentos en la 43-a jubileo de nia Redakcio, la 4-an de aprilo nunjare kaj en sekvanta „Leterkesto” la 7-an de aprilo. En la konkurso ni lotumos inter ĉiuj partoprenantoj valorajn objektajn premiojn. Ni deziras al vi bonŝancon en la lotumado de la premioj.

Ni forte esperas, ke vi subtenos nian laboron per via partopreno en la konkurso. Popularigu ĝin inter viaj samklubanoj kaj leteramikoj!

— Estro de la E-Redakcio (Barbara Pietrzak)
www.wrn.org/ondemand/poland.html